„En la lastaj tagoj antaŭ la murigado kaj fermo de la hebrea kvartalo, mi venis al f-ino Zamenhof, kaj mi proponis al ŝi kaŝi sin ĉe mia pola familio. Sed tiu nobla virino rifuzis mian proponon savi sin, dirante, ke mi kun mia familo povus perdi niajn vivojn, ĉar kiu kaŝas hebreon, tiu pereas mem kune kun trovita hebreo. F-ino Zamenhof estis bruligita en la mortigejo por hebreoj en Treblinka, loko inter Varsovio kaj Bialystok."
En *„Esperanto Internacia"*, no. 9a, estas mencio pri informo aperinta en la „Bulteno de Pola Esperantista Societo" pri la sorto de la familio Zamenhof, kies teksto estas jena:
Tuj post la eniro de la germanoj, la gestapo elserĉis la familion de nia mastro, jam en nova loĝejo, ĉar ilia domo en Krolewska strato enstis ruinigita. La filo de la Majstro, D-ro Adamo, estis arestita kaj de tiam ĝis nun estas nenia signo pri lia vivo. Kune kun li oni arestis lian edzinon, s-inon Wanda kaj la filinojn de la Majstro, Sofia kaj Lidja, sed post kelkmonata karcerigo ili liberiĝis. En 1940 la germanoj aranĝis en Varsovia t.n. „ghetto" kien transloĝiĝis ankaŭ la familio de nia Majstro. En 1943, kiam la germanoj komencis gasveneni la loĝantaron de Polujo, f-ino Sofia estis elveturigita el la „ghetto" kaj mortigita. Post iom da tempo germanoj traserĉis kaj kolektis malsane aspektantajn hebreojn, kiujn ili veturigis el la „ghetto", laŭdire por saniĝi ilin. Sed anstataŭ tio, ĉiuj estis dispafitaj proksime de la „ghetto". Inter ili estis f-ino Lidja Zamenhof.
El la tuta familio de nia Majstro vivas nun nur s-ino Wanda (en Varsovio) kaj ŝia filo Ludoviko, studento en Lublin. En la nomo de la Esperantistaro ni sendas al ili niajn plej sincerajn doloresprimojn.
Al tio la redakcio de E. I. aldonas:
Lastmomente: ni jus ricevis informon de s-ino Wanda Zamenhof, ke ŝi ankoraŭ havas esperon, ke D-ro Adam kaj f-inoj Lidja kaj Sofia ankoraŭ vivas.

## † FUNEBRA KOLONO †

Al la jam aperintaj listoj de la funebra kolono ni bedaŭrinde devas aldoni la nomon de

K-do JACOB KLOMPIEN

fidela kaj aktiva ano de sekcio Amsterdam 1a.
Ni ricevis la informon, ke li la 2an de decembro 1944 mortis en la koncentrejo Mauthausen en Germanio.

### GRAFIKAJ ESPERANTISTOJ

Post la unuaj anoncoj en L.E. kaj Grafisch Weekblad anoncis sin pluraj gekolegoj en Nederlando.
La iniciatintoj aranĝis kunvenon, kie oni decidis utiligi kaj propagandi Esperanton inter niaj samprofesianoj en formo de klubo. Por komenci la kotizo estas 25 cdj en monato.
Ĉiu gelaboristo el la grafika kaj rilataj metioj, kiu estas membro de agnoskita sindikato, povas aliĝi.
Ni jam havas kontakton kun samprofesianoj ekster Nederlando kaj kio povos esti pli interesa ol trakti laborkondiĉojn kaj teknikajn aferojn kun alilandaj kolegoj?

F. B. E. TEN HAGEN, sekr.
Nepveustraat 33 II, Amsterdam-W

## KONSTRUŜTONOJ

*Dum la lastaj jaroj ni devis batali por nia ekzisto kvazaŭ neraciaj bestoj. Per kadukaj bicikloj aŭ piedirante per eluzitaj ŝuoj ni vagis sur la kampo kaj petis, petegis la kampistojn vendi al ni legomojn aŭ terpomojn. Kaj ofte ni venis hejmen en la urbo kun laca korpo, sed sen la tiom bezonataj nutrajoj. La alian tagon ni denove provis nian feliĉon kaj ree enmigris la kampon, denove klopodis akiri per mono aŭ per vestoj aŭ per objektoj la nemankipovajn varojn, kiuj povos satiĝi niajn malplenajn stomakojn.*
*Vespere kiam regis mallumo, aŭ nokte kiam estis tute malpermesite veni sur straten ni forlasis niajn hejmojn kun segilo kaj ŝnuroj en la manoj, ĉar krom malsaton ni suferis malvarmon. Singarde ni esploris ĉu la ĉirkaŭaĵo estas senhoma, kaj rimarkinte ke ĉio estas sendanĝera, ni iris al nia arbo jam elektita de ni dum la tago. Post kelkhora segado ni estis konkerintaj nian arbon, se almenaŭ policisto aŭ soldato ne estis ĝeninta nin.*
*Tiel ni vivis dum longa tempo, sed ni sukcesis savi nin de la morto.*
*En tiaj cirkonstancoj oni ne povas enprofundiĝi en spiritajn aferojn, eĉ konscia laborista esperantisto, vivanta tiel, ne dediĉas sin al studado kaj uzado de sia lingvo.*
*Sed nun niaj korpoj ne plu malsatas, kvankam ni havas ankoraŭ multajn aliajn zorgojn. Kaj kiam silentas la stomako, ekparolas la spirito: ankaŭ ĝi bezonas nutron.*
*Por kontentiĝi la malsaton, la spirito de laborista esperantisto disponas pri bonega nutro. Denove aperas „La Progresanto", la konata studgazeto de nia Federacio. Abonu ĉi tiun organon kaj vi ĝuos multajn agrablajn horojn. Vi spertiĝos en nia lingvo kaj pli perfekte povos ĝin uzi por la interesoj de viaj samklasanoj.* *H. Sch.*

UZADO DE KELKAJ KORPOPARTOJ.

En mia kurso mi petis unu el miaj kursanoj noti kaj lerni 40 nomojn de korpopartoj, kaj poste fari per ili kompletajn frazojn. Anstataŭ tio, li faris mallongan verkajon, el kiu mi forigis kelkajn nekorektaĵojn, sed kiu estas cetere sufiĉe bona. La originala maniero, laŭ kiu li plenumis sian taskon, donis al mi la ideon prezenti lian verkajon al „L.E.". Eble aliaj kursgvidantoj povas profiti per ĝi. Jen ĝi estas:
Multfoje, kiam ni estis ankoraŭ junaj, ni piediris tra la ĉirkaŭaĵoj de Amsterdamo. Somere kaj ankaŭ vintre. Pro tio ni devis uzi diversajn partojn de nia korpo. Unue niajn okulojn, ĉar estas multaj objektoj vidindaj en niaj nordhollandaj polderoj. Per mia fingro mi montris al mia edzino la flugantajn alaŭdojn kaj aliajn birdojn, altsupre en la aero, daŭre fajfantajn. Niaj nazoj ankaŭ flaris ĉiam ion alian, la fojnon sur la kampoj, aŭ la florojn aŭ sterkamasojn de farmbienetoj, kiujn ni preterpasis. Ni ĉiam iris nudkape, pro tio la vento povis ludi tra niaj haroj. Niaj vangoj, brakoj kaj la tuta haŭto ruĝiĝis pro la suno. Sur mia dorso estis la dorsosako, en kiu troviĝis la manĝajoj, ĉar ni restis la tutan tagon ekstere en la libera naturo. Kelkfoje ni sidis ĉe la flanko de vojeto aŭ foseto en la herbo sur nia postajo. Komprenebele ne en la vintro. En la vintro, kiam la akvo estis kovrita per glacio, kaj kiam oni povis glitveturi, ni faris glitveturadon. Tiam niaj kruroj en la vespero doloregis, precipe la unuajn tagojn. Tio estas bona sporto por ĉiu parto de la korpo. La sango fluas rapide tra la vejnoj, niaj pulmoj pleniĝas per freŝa aero, kaj kiam ni vespere iris hejmen, ni estis lacaj kaj niaj stomakoj grumblis pro la malsato. Kaj kiam la manĝajo estis preparita, ĝi bongustis al ni kaj ni volonte volis dormi. J. W. Minke.

# Uit de Districten

## DISTRICT AMSTERDAM

Secr.: G. Brugman, Orteliusstr. 231 hs (W)

DEBUTO DE LA „VERDA KABARETO"

Ĉar ĝi ne pli frue povis pretiĝi sian programon, la „Verda Kabareto" unuafoje prezentos sin al la orient-kvartalaj ĝekamaradoj en salono „Marcanti", Veelaan 12—14. La kunveno okazos la 26an de januaro, vespere je la 8a.

Enirbiletojn po 40 cendoj oni mendu pere de la sekciaj sekretarioj al la sekretario de la distrikto, antaŭ la 19a de januaro.

Sekr.

## DISTRICT GELDERLAND

Secr.: Amsterdamscheweg 30, Arnhem

La kotizo por ĝeneralaj-anoj estas f 3.60 jare *inkluzive* la distrikta kotizo. Pro miskompreno mi petis en la antaŭa L.E. krom-kotizon por la distrikto. Kiu ankoraŭ ne pagis, faru tion rekte al la federacia kasisto: k-do J. Pouli, Elegaststraat 19 hs, Amsterdam-W.

Sekr.

## DISTRICT VLAANDEREN

Secr.: Cockerillkaai 21, Antwerpen

Fine la distrikto por Flandrio ankaŭ reprenis sian aktivecon. Prezentiĝis gravaj malfacilaĵoj. Interalie la kontakto inter komitatanoj kaj membroj tute rompiĝis. Multe da adresŝanĝoj pro la bombardo per la flugantaj bomboj. Eĉ le sekretariejo estas detruita. La sekretario mem grave estis vundita. Feliĉe la havaĵo plej parte estas savita.

Sed forgesitaj estas la teruraj momentoj. La komitatanoj retrovis unu la alian kaj tuj interkontaktis. Antaŭ ol renoviĝi la interliĝon kun la diversaj sekcioj ili volis restariĝi la lokan movadon. Regule kunvenoj jam okazas, kaj montriĝas ĝojiga konstato. Antaŭ la milito la Antverpenaj laboristoj esperantistaj estis dividitaj. Ekzistis ja du tendencaj grupoj nun ne nur interkonsente kunlabogrupoj. Nun tiu situacio ŝanĝiĝis. Ambaŭ grupoj nun ne nur interkonsente kunlaboras, sed ili ambaŭ aliĝas al nia Federacio. Tiu fenomeno komence forigos ĉiun kontraŭlaboron kaj donos duoble pli grandan laborkampon. Ne estante profetoj, ni tamen rajtas diri ke la rezultatoj baldaŭ estos videblaj.

Nun pli grandskala laborado estas pristudata. Kiel unua paŝo tiudirecten ni organizas tutflandran kunvenon. Estas nepre necese ĉar intervidiĝo komplete ĉesis dum proksimume kvin jaroj.

Ciuj sekcioj en Flandrio estas urĝe petataj sendi deliĝiton al tiu renkonto. Jena sciiĝo en L.E. devas esti konsiderata kiel i n v i t o n. La kunsido okazos en Bondsgebouw, 49 Ommegankstraat, Antwerpen, dimanĉon la 20an de januaro 1946a.

Estas kompreneble superflua insisti ke nova komuna agado estas necesa. Verŝajne ni devas adopti novajn metodojn. Sugestoj tiurilate estas atendataj.

La tagordo: stariĝi definitivan distrikton. Elekto estraro. Laborplano. Raportoj. Eventualaj proponoj.

Ni firme esperas, ke ĉiu sekcio estos oficiale reprezentata (kostoj de la deliĝito estos repagataj) kaj ke multaj membroj ankaŭ profitos tiun okazon por renoviĝi la konatiĝon.

La provizora estraro estas: prezidanto, Willekens, Holland 31, Antwerpen; sekr.: Mortiers, Cockerillkaai 21, Antwerpen; kasisto, Bovoj, Minderbroedersrui 64, Antwerpen.

## DISTRICT ZUID-HOLLAND

Secr.: Frankendaal 135, Rotterdam

La 25an de novembro, sekcio Hago aranĝis tuttagan ekskurson kaj invitis la S.H.D.-on al partopreno.

Relative multaj el nia regiono partoprenis kaj estis je la 9a kaj duona horo ĉe la stacidomo en Hago.

De Haganoj akompanate, ni iris al Sheveninga-vojo 44, tie loĝas Haga kamarado, kiu disponis sian hejmegon por kunveni. Kantoj kaj muziko agrabligis la kolektiĝhoron kaj poste nia grupo promenis laŭlonge de la marbordo.

Tiuj, kiuj antaŭ longe vizitis la marbordon, preskaŭ ne plu rekonis ĝin.

Laŭlonge de la bordo ni vidis la trunkojn de la arboj, kiuj iam estis la gloro de la Sheveninga arbaro.

La interne detruitaj konstruaĵoj atestas la senviviĝon de la iama plenviva banurbo.

Ni konsciiĝis, ke certe longe daŭros antaŭ ol ni povos ree ĝui la restadon ĉe la marbordo de Sheveningo.

Je la la horo ni ree estis en la domo de k-do Brooshoofd, por komune manĝi kaj.... trinki kafon.

La kunesto dum manĝado ĉiam estas tre agrabla momento ĉe tiaj aranĝoj, kaj per kantado, muziko kaj paroladetoj, la tempo forflugis.

La tago finiĝis per vizito al la Mesdagmuzeo, kiu vizito per si mem jam estas inda por aranĝi tagan ekskurson.

Mi postulus tro da loko en nia gazeto, se mi raportus ankaŭ pri tiu muzeo iom detale.

Mi esperas, ke la Haganoj en printempo refoje aranĝos ion tian kaj mi jam nun instigas tiujn, kiuj ne partoprenis la nunan, tiam certe esti kun ni.

De ĉi tiu loko mi volas ankoraŭ foje danki ĉiujn, kiuj iel agrabligis la ekskurson.

Ankaŭ dank al la estraro de sekcio Hago pro la invito, kaj espereble ĝis baldaŭa revido.

P.S. Sekciaj kasistoj en nia distrikto, pagu baldaŭ vian kotizon al nia kasisto, por ke ni povu labori.

Nome de la kasisto: J. v. Bezouwen, Mijnsherenlaan 110, Rotterdam.

Sekr.

# Bestuursmededelingen

*Congresvoorstellen.*

Men houde er rekening mede, dat de congresvoorstellen uiterlijk 15 Februari a.s. in ons bezit moeten zijn, de amendementen uiterlijk 15 Maart.

*Het jaarverslag.*

Het jaarverslag van de Federatie verschijnt in het Februari-nummer van L.E. Gezien in het September-nummer reeds een verslag is verschenen over de periode 1940-1945, zal dit aanvullend verslag uit de aard der zaak zich beperken tot de meest belangrijke mededelingen, die nadien, voortvloeiende uit de congresbesluiten, voor onze organisatie van belang zijn.

Het verslag van den penningmeester wordt zo spoedig mogelijk gepubliceerd. Door de omvangrijke werkzaamheden op dit gebied kunnen wij er echter niet voor instaan, dat dit reeds in het Februari-nummer kan verschijnen.

*Bestuursverkiezingen.*

Met zekerheid kunnen wij thans reeds mededelen, dat tenminste twee van onze huidige bestuursleden niet meer herkiesbaar zullen zijn, n.l. k-do Kroonder, die thans woonachtig is in Bussum, en dus reglementair niet meer herkiesbaar is (afgezien daarvan of zijn particuliere bezigheden hem wel voldoende vrijheid zouden laten), en k-do Schoonenberg, die door overdrukke werkzaamheden zich genoodzaakt ziet te bedanken.

K-do Pouli zal zijn functie van penningmeester niet meer kunnen vervullen, doch blijft beschikbaar voor de behartiging van de commerciële belangen van de Libro-Servo.

Men berade zich dus om hierin voorzieningen te treffen.

*Schriftelijke Esperanto-cursus voor beginnelingen.*

Wij vestigen de aandacht van onze afdelingsbesturen op de mogelijkheid om nog cursisten in te schrijven voor onze schriftelijke cursus.

Elders in ons blad komt een uitvoeriger mededeling hieromtrent voor.

*Ons orgaan.*

L.E. verschijnt van Januari af zo mogelijk op de eerste Zaterdag van elke maand.

*La Progresanto.*

Van Januari af verschijnt wederom ons studieorgaan La Progresanto. Een gerede aanleiding om met het eerste na-oorlogse nummer nog eens extra propaganda te maken. Het aantal abonné's is de 800 gepasseerd. Zonder twijfel kan dit aantal nog worden verhoogd. Ook onder de cursisten heeft het een taak te vervullen. De abonnementsprijs is laag, n.l. f 1.75 per jaar. Leden betalen f 1.25.

# Uit de afdelingen

## AFD. AMERSFOORT

Secr. Vermeerstraat 16

Ni festis la Zamenhofvesperon la 15an de decembro. K-do Degenkamp prelegis pri la idealismo kaj pacideo de Dr. Zamenhof. La ceteran parton de la programo la membroj kompletigis per teatraĵoj, deklamaĵoj kaj kantoj.

Precipe ni deziras danki K-dinon Roskam-Smit pro la pianludo kaj akordionludo.

La anoj, kiuj brilis pro neĉeesto, maltrafis kamaradecan esperantan vesperon.

## AFD. AMSTERDAM X

Secr.: Marco Polostraat 106 II (W)

Kiu povas haviĝi al mi la nunajn adresojn de jenaj gek-doj, kiuj antaŭ la milito apartenis al nia sekcio?

Geedz. Bodt, Kdo. F. de Kruyf (pli bone konata kiel Teunis Land), k-do Mortel, k-do Veekman, k-dino Weggelaar, k-do Witte, k-do Wijnands.

Helpu min, se vi scias la adresojn.

Sekr.

## AFD. ENSCHEDE

Secr.: Estrikstraat 37

Het gaat met onze bijeenkomsten niet zoals het gaan moet. Zij zijn doorgaans slecht bezocht, vrienden dat moet niet. Wij hebben aller medewerking nodig. Laat dat dus in het komende jaar beter worden. Wij hebben momenteel 2 cursussen. De ene cursus, die bijna geëindigd is, onder leiding van k-do de Bruin heeft 18 deelnemers en de andere onder leiding van k-do Schmale heeft 11 deelnemers. De bijeenkomsten worden voortaan gehouden elke 14 dagen (wegens gebrek aan brandstof) in het gebouwtje van de bouwvereniging „Licht en Lucht" aan de Schouwinkstraat. *Komt dus allen!*

Secr.

## AFD. GRONINGEN

Secr.: Nachtegaalstr. 19a

La 13an de decembro ni festis, kune kun la aliaj Esperantaj unuiĝoj, nian Zamenhofan vesperon. Kvankam parto de nia anaro ne ĉeestis pro deĵoro, la nombro da vizitantoj estis kontentiga.

Nia prezidanto malfermis la kunvenon kaj rememorigis la mortintajn samideanojn. Li bonvenigis ĉiujn ĉeestantojn kaj esperis, ke en la estonteco nia laboro estos fruktedona.

Sub gvidado de s-ro Mook, (L.E.E.N.) ni komune kantis kelkajn esperantajn himnojn. S-ro Starke (N.C.E.V.) kaj Ooisterwijk, (L.E.E.N.) deklamis.

La kanthoreto de L.E.E.N., „La Verda Voĉo", kantis, antaŭ kaj post la paŭzo, tre meritoplene, kelkajn kantaĵojn. Nia aktoraro (fanfaronulo, ĉu ne?) reprezentadis „Vrede door Esperanto". Nia k-do F. Munniksma paroladis pli ol horon pri la vivo de nia „Majstro" kaj pri la estiĝo de nia kara lingvo.

Li rememorigis la gefilojn de Dr. Zamenhof,

kiuj preskaŭ ĉiuj estas murditaj de la germanaj sadistoj. La ĉeestantoj leviĝis kelkmomente por rememorigi la viktimojn. Li finis sian paroladon, instiginte la ĉeestantaron batali por nia ideo, por ke la mondo iam fariĝu enloĝebla por la tuta homaro.
S-ro Geertsema (N.C.E.V.) post komuna kantado, fermis la kunvenon.

Sekr.

**AFD. HEERLERHEIDE**

Sabaton, la 15an de decembro, la sekcio Heerlerheide okazigis festvesperon okaze la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof. Multaj gekamaradoj, lernantoj kaj interesiĝintoj ĉeestis. La ĉefestrarano, k-do De Vries paroladis nederlandlingve. Streĉe la ĉeestantoj aŭskultis kaj per aplaŭdo rekompencis lin. Kantistino tre bele kantis kelkajn kantojn.
K-do Willems el Kerkrado tre bone prizorgis la muzikon, kaj kelkaj aliaj kamaradoj per deklamaĵoj k.t.p. plue amuzis la ĉeestantojn. La vizitintoj el aliaj sekcioj povis tranokti ĉe la gekamaradoj en Heerlerheide, sed la Vaals-anoj ankaŭ dimanĉe ne povas atingi sian hejmon kaj tial ne ĉeestis. Sed spite tion la vespero estis sukcesa kaj sendube portos fruktojn.

S.

**AFD. KOOG-ZAANDIJK**
**Secr.: Tulpstraat 33**

La unuan de junio nia sekcio refondiĝis kun 16 gemembroj. Jam dum la liberfesto-tagoj ni havis la okazon propagandi nian belan lingvon. Per remboato ni partoprenis en la akvofesto, kaj 16 ope ni kun flagoj kaj tukoj kunmarŝis en la demonstracio. Kvankam ni ankaŭ dum la verda monato faris multan propagandon, la interesiĝo por la komenckurso ne estis granda, tamen poste anoncis sin 19 gekursanoj. La elementa kurso estas gvidata de k-dino L. Harshagen-Put.
La konversacia vespero okazas ĉiun vendreje la oka en la manĝejo de la fabriko „Chios". Ĝi estas kontentige vizitata kaj la diskutoj viglaj. La forrestantoj malpravas.

La sekr.

**AFD. ROTTERDAM 2**
**Secr.: Langegeer 28.**

Por niaj sekcianoj ni havas agrablan komunikon. Ek de januaro ni denove konversacios ĉiusemajne, lundvespere en Zuider-Volkshuis.
La salono estas agrable varmigita, do venu multnombre kaj regule, la estraro faros sian eblon, do ankaŭ vi faru vian eblon. La konversaciaj vesperoj ĉiam estas instruaj kaj intimaj.
Montru vian aktivecon kaj kunlaboru por la bono de nia idealo!

Sekretariino.

**AFD. ROTTERDAM 6.**
**Secr.: Zegenstraat 67B.**

La 3an de decembro ni havis membrokunvenon. La ĉefpunkto estis elekti novan prezidanton kaj asesoron. K-do Van Rijn ne plu povas funkcii kiel prezidanto pro familiaj cirkonstancoj. Nome de nia sekcio ni dankas lin por la laboro, kiun li faris kaj ankaŭ k-do Blanken ni dankas. Oni elektis k-don Huizer kiel novan prezidanton, kaj k-don Hoek kiel asesoron. Gek-doj, notu la 14an de januaro: estos intersekcia vespero en la suda popoldomo. Venu ĉiuj, ĉar la temo estas sufiĉe grava. La estraro instigas vin ĉiam viziti la klubvesperojn.

Sekr.

**AFD. SCHIEDAM**
**Secr.: Gasstraat 29**

Ne ofte Ŝidamo sin anoncas en L.E., sed tio ne signifas ke ni estas neaktivaj. Male, se ni konsideras la kreskon de aliaj sekcioj en same grandaj urboj, ni ne nestu malkontentaj. Jen la novaĵoj el Ŝidamo.
Tuj post la liberiĝo ni restarigis nian grupon, al kiu baldaŭ multaj novaj kaj malnovaj gekamaradoj aliĝis. Unu gravan perdon ni havis, ĉar mortis nia fervora kasisto en koncentrejo. Ni promesis glorigi lian laboron per ankoraŭ pli streĉa laboro. Kaj ni faris. La membronombro altiĝis ĝis 54. Regule ni konversacias vendredvespere en salono Lange Haven 33. Niaj vesperoj estas certe altnivelaj kaj donas por ĉiu ion lernigan. Ni pritaktas lingvajn problemojn, paroladas niaj kapablaj kaj (kuraĝaj) anoj. Ni praktikas liberan konversacion, kaj.... estas vera sukceso. Post propagando, kiu pro la konataj cirkonstancoj ne povis esti tre granda, ni havis jenan rezultaton. Komenckurso de 40 partoprenantoj, kaj infankurso de pli ol 30 infanoj. Jam restariĝis niaflanke la komitato „Esperanto ĉe la instruado", kaj ni ankaŭ serĉis kontakton kun la aliaj Esperanto-grupoj ĉi urbe, kiuj ankoraŭ ne restariĝis.
Nia teatrajgrupo refunkcias, kaj jam ekstudis. Gvidanto k-do De Vogel.
La biblioteko, kiun „die Herren" forŝtelis de ni, restas delikata punkto. Ni ree bezonas nian bibliotekon, sed kiel akiri. Mi notas 54 anojn, povas esti 54 donacoj en formo de libro. Kaj ni jam akiros sufiĉe amplekssan bibliotekon. Ne ĉiu donaco bezonas esti majstraĵo, sed donacu ian esperantolibron. Ankaŭ la S.A.T.-afero progresas en nia sekcio. Jam (re) aliĝis 29 gek-doj. Ni provos regule ĉiumonate kunveni.
Gek-doj Ŝidamanoj mi mencias ĉiujn tiujn ĉi detalojn ne por esti fiera, sed por konvinki vin pri la neceso de via kunlaboro, por ke ni fariĝu pli granda, pli aktiva rondo. Esperanto estu nia idealo, kaj ni veraj idealistoj.

A. van Rosmalen

**AFD. SCHAGEN**
**Secr.: C. Vos, D 38, Barsingerhorn**

En la lastokazinta kunveno ni decidis pligrandigi kaj ŝanĝi la estraron.
Ĝi nun konsistas el: R. Rienks, prez.; A. Winkel, kasisto; C. Vos, sekr.; J. Jonker, vicprez. kaj J. Winkel, libro-servanto.
La membronombro nun estas 17. La jarkunveno okazos la 20an de januaro.

Sekretario.


## Schriftelijke cursus voor beginners

★

Degenen, die niet in de gelegenheid zijn aan een mondelinge cursus voor beginners deel te nemen, geven zich op voor onze schriftelijke Esperanto-cursus voor beginners.

**Het lesgeld bedraagt f 0.30 per les.**
(Per 5 lessen vooruit te betalen).

Aantal lessen bedraagt ongeveer 30. Duur een half jaar. Leermiddelen zijn in het lesgeld begrepen.

Vraagt inlichtingen aan:

**FEDERATIE VAN ARBEIDERS ESPERANTISTEN,**
Vier Heemskinderenstraat 53²
Amsterdam-West


**AFD. UTRECHT**
Secr.: Bollenhofschestraat 72

La dek-kvaran de decembro nia sekcio organizis Zamenhofan vesperon. Post malfermo fare de la prezidanto, k-do Slijper ĉarmis ĉiujn per sia sprita parolado pri la vivo de d-ro Zamenhof. Post tio k-do Varkevisser belmaniere deklamis kelkajn poemojn.
En la paŭzo, en kiu ĉiuj ricevis kafon aŭ limonadon, oni havis la okazon rigardi la aĉeteblajn stud- kaj leglibrojn. Kelkaj aĉetis ekzemplerojn.
Post la paŭzo k-do v. Dijk parolis pri Esperanto, kaj k-dino Bekkers-Scholten faris tre interesan paroladon pri sia vojaĝo al la Kopenhaga kongreso. Post ŝia parolado ĉiuj havas la okazon por rigardi la diversajn gazetojn kaj fotografaĵojn rilate al tiu kongreso.
Dankinte la parolintojn pro ilia kunlaboro, la prezidanto proksimume je la deka fermis ĉi tiun agrablan vesperon.

P. Havers, sekr.

**AFD. WILLEBROEK.**
**Secr.: Appeldonkweg 37.**

Je la 8.30 horo nia prezidanto malfermis la kunvenon, kaj li tuj donis la parolon al k-do Borghijs, nia raportisto. Aŭdinte la raporton, oni unuanime akceptis ĝin. La unua punkto traktis pri la propaganda artikolo, kiu ĝis nun ankoraŭ ne aperis en la regiona gazeto „De Waarheid". La sekretario petis al k-do Van der Plas. Ĉu li povas deklari kial la artikolo ankoraŭ ne aperis? K-do Van der Plas respondis: „Laŭ la deklaroj de la sekretario de la nomita gazeto, la kaŭzo estas la troo da ensenditaj artikoloj el Willebroek, sed li certigis al mi, ke nepre la sekvontan semajno la artikolo aperos. (Prave la artikolo jam aperis.) La estraro dankas la redakcion de „De Waarheid" pro la plenumo de nia deziro. Poste k-do Borghijs proponis organizi konversaciajn vesperojn. Gravaj diskutoj sekvis kaj finfine ni decidis aranĝi nian unuan konversacian kunvenon ĉe k-do van der Plas. Nia prezidanto instigis la ĉeestantojn, kaj precipe la neĉeestantojn en la estonto regule viziti la konversaciojn, ĉar ju pli oni parolas Esperanton, des pli bone oni povas kompreni kaj paroli ĝin. Sekve, k-doj vizitu regule niajn konversaciajn vesperojn, kiuj okazos ĉiusemajne.

Sekretario.

**AFD. ZAANDAM**
**Secr.: Franschestraat 17, tel. 3571)**

Zondagmorgen 16 December vond onze, reeds eerder aangekondigde Zamenhof-herdenkings-bijeenkomst plaats. Het is werkelijk een succes geworden. Honderd esperantisten uit de Zaanstreek en zelfs enigen uit Amsterdam waren in een kameraadschappelijke Esperanto-sfeer bijeen.
De aanwezigheid van k-do Faulhaber was al een waarborg, dat het goed zou worden, het door hem gesproken woord werd dan ook met onverdeelde aandacht aangehoord. Er werd gezamenlijk gezongen o.a. La Espero, Fratoj al Sun, Se ni Vagas en La Internacio. De zaal was versierd met de afdelingsvlag en doeken met opschriften o.a. „Per Esperanto por Socialismo", „Esperanto op de scholen" en „Arbeiders leert Esperanto".
Het was een leerzame en propagandistische bijeenkomst, vooral ook daar verscheidene cursisten van de, in Zaandam lopende Esperanto-cursussen aanwezig waren. Toen onze voorzitter k-do J. Vis de bijeenkomst, na het zingen van „La Internacio", sloot, bleven nog een twintigtal geestverwanten bijeen voor de bespreking aangaande de heroprichting van een „S.A.T.-rondo". Het resultaat van deze korte bespreking was dat van Zondag 16 Dec. af S.A.T. in de Zaanstreek weer vertegenwoordigd is. Een meer officiële vergadering zal spoedig volgen. Voorlopig is k-do Groenescheij (Tulpstraat 33 Koog a. d. Zaan) „peranto".

Het Bestuur